En 1906 L.L. Zamenhof (1859-1917) elpaŝis en esperantujo publike kun ideo, kiu mirigis kaj ekscitis parton de la tiama esperantistaro. Temas pri la diskuto ĉirkaŭ la doktrino de la hilelismo-homaranismo, kiu ne nur dominis la enhavon de la revuo *Ruslanda Esperantisto* (Sankt-Peterburgo), en kiu la hilelisma teksto aperis en 1906, sed kiu radiis internacien. La sorto de tiu teorio, sen kiu la esperantismo de Zamenhof ne estus tute komprenebla, estis poste apostrofita per ‘La ideologia dramo de LLZ’ (Gaston Waringhien en *Sennacieca Revuo* 81/1953).

La hilelismo-homaranismo fakte dumvive okupis Zamenhofon, kiu devenis de etne kaj religie miksitaj regionoj de orienta Eŭropo, kaj formis la kulminon de liaj idealismaj imagoj aŭ vizioj. Ĉi tiu teorio prezentis fortan soci(politik)an-religian akcenton, kaj ĝia kerno estis serĉata en la specifa judeco de Zamenhof kaj en ties ideo solvi la judan problemon (precipe en la Ruslanda Imperio, kie fortiĝis tradicia kontraŭ-judismo kaj eksplodis kontraŭjudaj pogromoj), en la heterogeneco de la etna, religia kaj lingva situacio en Ruslando kaj en la kritiko pri aŭ reago al la tiamaj universalismaj strebadoj diverstipaj (precipe cionismo).

Zamenhof konsideris, ke la etnaj, lingvaj kaj religiaj diferencoj de la homaro estas la ĉefaj kaŭzoj de ĉia malpaco inter la popoloj, kiuj povus esti solvitaj fakte nur per la hilelismo-homaranismo (kaj kompreneble per la lingvo Esperanto). Zamenhof revis, ke la antagonismoj etnaj, lingvaj kaj religiaj malaperos kaj ke ili estos anstataŭitaj de alternativaj ‘neŭtralaj’ etikaj rilat-principoj kiel solvo ne nur por la judoj, sed finfine por la tuta homaro. Laŭ tiu logiko fakte li inventis ‘neŭtrale-homan’ lingvon (Esperanto), celis krei ‘neŭtrale-homa’ religion (hilelismo) kaj starigi ‘neŭtrale-homajn’ rilatojn inter la etnoj (homaranismo kiel plievoluigita hilelismo). Ĉe Zamenhof ‘neŭtrala’ signifis probable la sumon de la altaj etikaj valoroj, kiuj estas komunaj al ĉiuj homoj, etnoj kaj religioj (kaj ankritaj en la humanismo). Ĉiukaze la celon de la homaranismo Zamenhof difinis kiel strebado al absoluta justeco kaj egaleco inter la popoloj kaj religioj.

Kuraĝigita de la bulonja kongres-sukceso, Zamenhof decidis sciigi al la e-ista publiko siajn konvinkojn en la formo de la *Dogmoj de Hilelismo*. Tio okazis anonime en la periodaĵo *Ruslanda Esperantisto*, en januaro 1906. Sed ho ve! – la publikigo de la hilelismo (poste homaranismo) rikoltis, krom kelkaj aproboj, akrajn reagojn de diversaj flankoj, kiuj komplete rifuzis la teorion de Zamenhof. Katolikoj malkovris novan kaj nedezirindan savinstruon konkurencon al la kristanismo, ateistoj kritikis ĝian same malhavindan religiecan karakteron, iuj francaj e-istoj evidente havis problemon akcepti la mistikaĵon el Rusujo. Cetere post tiuj protestoj Zamenhof atentigis, ke la hilelismo ne estas nova religio.

En la sama jaro Zamenhof volis prezenti sian hilelismon-homaranismon al la partoprenantoj de la 2a universala kongreso de la e-istoj en Ĝenevo. Sed ho ve! – oni baris al li tiun intencon. Emile Javal, eminenta franca e-isto, kompreninte la tiklan situacion, kiun Zamenhof kaŭzis kun sia doktrino, konsilis al la humanisto el Varsovio eĉ ne veturi Ĝenevon por eviti publike paroli pri la homaranismo kaj tiel eviti eventualan skandalon. La aŭtoro de Esperanto ofendiĝis kaj efektive dubis ĉu li entute alvenu en la kongreso. Sed ekhavinte malbonan konsiencon, li tamen veturis, kaj anstataŭ paroli pri la homaranismo mem li emfazis sian komprenon pri la ‘interna ideo’ de Esperanto. La elstara parolado de Zamenhof trovis varman akcepton en Ĝenevo, kaj ĝi restis unu el la plej trafaj kaj impresaj tekstoj iam ajn verkitaj en Esperanto pri tiu ĉi temo. La de kelkaj kolegoj proponitan koncepton de Esperanto, ke ĝi servu nur al praktikaj celoj sen konsideri la flankon idean, Zamenhof klare rifuzis.

Kvankam la hilelismo-homaranismo mem poste estis grandparte forgesita de la e-istoj, multaj inter ili estas konvinkitaj, ke sen tiu ideologia bazo la interna ideo de Esperanto ne ekzistus. Ĝuste la interna ideo respondecas apud la genia gramatika konstruado de la lingvo Esperanto, ke tiuj lingvo kaj movado pluvivis. Do ekzakte en tiuj du punktoj Esperanto distingiĝas de aliaj planlingvoj, kiuj post Esperanto estis proponitaj kaj kiuj fakte estas pli lingvistike ol sociideologie orientitaj.

Bibl.: Dr. L.L. Zamenhofs Esperanto-Reden gehalten bei Eröffnung der Esperanto-Kongresse 1905-1912. Mit Einleitung über Programm und Ursprung des Esperantismus, begleitender deutscher Übersetzung und Anmerkungen. Herausgegeben von Dr. Emil Pfeffer. Wien (Jahrgabe fehlt).

Originala teksto (en la lingvoj Esperanto kaj en germana traduko):

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj!	Geehrte Damen und Herren!
Mi esperas, ke mi plenumos la deziron de ĉiuj alestantoj, se en la momento de la malfermo de nia kongreso mi esprimos en la nomo de vi ĉiuj mian koran dankon al la brava Svisa lando por la gastameco, kiun ĝi montris al nia kongreso, kaj al lia Moŝto la Prezidanto de la Svisa Konfederacio, kiu afable akceptis antaŭ du monatoj nian delegitaron.	Ich hoffe, dass ich den Wunsch aller Anwesenden erfülle, wenn ich im Augenblicke der Eröffnung unseres zweiten Kongresses in Ihrer aller Namen dem wackeren Schweizerlande meinen herzlichsten Dank ausdrücke für die Gastfreundschaft, die es unserem Kongresse bezeigt, ebenso Ihrer Exzellenz dem Herrn Präsidenten des Schweizer Bundesstaates, der vor zwei Monaten unsere Abordnung in liebenswürdiger Weise empfing.
Apartan saluton al la urbo Ĝenevo, kiu jam multajn fojojn glorie enskribis sian nomon en	Einen besonderen Gruß gilt der Stadt Genf, die

<p>la historion de diversaj gravaj internaciaj aferoj.</p> <p>Permesu al mi ankoraŭ esprimi en la nomo de vi ĉiuj koran dankon al la organizintoj de la nuna kongreso.</p> <p>[Zamenhof dankas al la svisaj esperantistoj, al la Provizora Centra Organiza Komitato, k.a.]</p> <p>Sinjorinoj kaj sinjoroj!</p> <p>Ĉe la malfermo de nia kongreso vi atendas de mi ian paroladon; eble vi atendas de mi ion oficialan, ion indiferentan, palan kaj senenhavan, kiel estas ordinare la oficialaj paroloj.</p> <p><i>Tian</i> parolon mi tamen ne povas doni al vi. Mi ĝenerale ne amas tiajn parolojn, sed precipe <i>nun</i>, en la nuna jaro, tia senkolora oficiala parolo estus granda peko de mia flanko.</p> <p>Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas por liberemo, por la plej elementa homa liberemo, por la <i>rajtoj de homo</i>.</p> <p>Pri tio ĉi mi tamen ne parolus al vi; ĉar se kiel <i>privata homo</i> ĉiu el vi eble sekvas kun intereso la malfacilan bataladon en la granda multmiliono lando, tamen kiel <i>Esperantistojn</i> tiu ĉi batalado ne povus vin tuŝi, kaj nia kongreso havas nenion komunan kun aferoj politikaj.</p> <p>Sed krom la batalado pure politika, en la dirita lando estas nun faranta io, kio nin kiel Esperantistojn ne povas ne tuŝi;</p> <p>ni vidas en tiu lando kruelan bataladon inter la <i>gentoj</i>.</p>	<p>schon oftmals ruhmreich ihren Namen in die Geschichte verschiedener wichtiger internationaler Angelegenheiten eingeschrieben hat.</p> <p>Gestatten Sie auch, daß ich in Ihrer aller Namen den Veranstaltern des gegenwärtigen Kongresses herzlichen Dank ausdrücke:</p> <p>[Zamenhof dankt den Schweizer Esperantisten, dem Provisorischen Zentral-Organisationsausschuß, usw.]</p> <p>Meine Damen und Herren!</p> <p>Bei der Eröffnung unseres Kongresses erwarten Sie von mir irgendeine Rede; vielleicht erwarten Sie von mir etwas Offizielles, etwas Gleichgültiges, Farbloses und Inhaltloses, wie es die offiziellen Reden gewöhnlich sind.</p> <p>Eino <i>solche</i> Rede kann ich Ihnen jedoch nicht geben. Ich liebe solche Reden im allgemeinen nicht, aber besonders <i>jetzt</i>, im gegenwärtigen Jahre, wäre eine solche farblose Rede meinerseits eine große Sünde.</p> <p>Ich komme zu Ihnen aus einem Lande, wo nun viele Millionen Menschen mühsam um die Freiheit, um die elementarste menschliche Freiheit, um <i>Menschenrechte</i>, kämpfen.</p> <p>Dennoch werde ich <i>darüber</i> nicht zu Ihnen sprechen; denn wenn auch jeder von Ihnen als <i>Privatmensch</i> den schweren Kampf in dem großen, viele Millionen zählenden Lande vielleicht mit Interesse verfolgt, als <i>Esperantisten</i> könnte Sie dieser Kampf nicht berühren und unser Kongreß hat nichts mit politischen Angelegenheiten gemein.</p> <p>Doch außer dem rein politischen Kampf geht in diesem Lande nun etwas vor sich, das uns als Esperantisten berühren <i>muß</i>:</p> <p>Wir sehen in jenem Lande einen grausamen Kampf</p>
--	---

<p>Tie ne homo de unu lando pro politikaj patrolandaj interesoj atakas homojn de alia lando – tie la naturaj filoj de sama lando ĵetas sin kiel kruelaj bestoj kontraŭ la tiel same naturaj filoj de tiu sama lando nur tial, ĉar ili apartenas al alia gento.</p>	<p>zwischen den <i>Rassen</i>.</p>
<p>Ĉiutage estingiĝas tie multe da homaj vivoj per batalado politika, sed multe pli da homaj vivoj estingiĝas tie ĉiutage per batalado <i>intergenta</i>.</p>	<p>Dort greift nicht ein Mensch des einen Landes um politischer, vaterländischer Interessen willen, Menschen eines anderen Landes an — dort stürzen sich gleich grausamen Bestien die eingeborenen Söhne eines selben Landes auf die ebenfalls eingeborenen Söhne jenes selben Landes, und zwar nur deshalb, weil diese einem anderen Volksstamme angehören.</p>
<p>Terura estas la stato de aferoj en la multelingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta Rusujo.</p>	<p>Täglich erlöschen dort viele Menschenleben im politischen Streit, aber noch viel mehr Menschenleben erlöschen dort täglich im <i>Rassenkampf</i>.</p>
<p>Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo!</p>	<p>Schrecklich ist der Stand der Dinge in dem vielsprachigen Kaukasien, schrecklich ist der Zustand in Westrußland.</p>
<p>Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi, en la urbo Bielostok, rigardadis kun doloro la reciprokan fremdecon, kiu dividas inter si la naturajn filojn de sama lando kaj sama urbo.</p>	<p>Verflucht, tausendmal verflucht sei der <i>Rassenkampf</i>!</p>
<p>Kaj mi revis iam, ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio ŝanĝiĝos kaj boniĝos.</p>	<p>Als ich noch ein Kind war, betrachtete ich in der Stadt Bielostok mit Schmerz die gegenseitige Fremdheit, welche die natürlichen Söhne desselben Landes und derselben Stadt untereinander trennt.</p>
<p>Kaj pasis efektive certa nombro da jaroj, kaj anstataŭ miaj belaj songoj mi ekvidis teruran efektivaĵon:</p>	<p>Und ich träumte einst, daß wohl eine gewisse Anzahl von Jahren vergehen und daß alles sich ändern, alles sich bessern würde.</p>
<p>en la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj.</p>	<p>Und wirklich verging eine Anzahl von Jahren und an Stelle meiner schönen Träume erblickte ich eine schreckliche Wirklichkeit:</p>
<p>Pro tio oni frakasis la kraniojn, kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj!</p>	<p>In den Straßen meiner unglücklichen Geburtsstadt stürzten sich wilde Menschen wie die allergrausamsten Tiere mit Hacken und Eisenstangen auf ruhige Einwohner, deren ganze Schuld nur darin bestand, daß sie eine andere Sprache redeten und eine andere angestammte Religion hatten als jene Wilden.</p>
<p>Mi ne volas rakonti al vi la terurajn detalojn de la bestega Bielostoka buĉado; al vi kiel al</p>	

<p>Esperantistoj mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas.</p>	<p>Deshalb schlug man die Schädel ein und stach die Augen aus, Männern und Weibern, hinfälligen Greisen und hilflosen Kindern!</p>
<p>Oni scias, ke ne la Rusa gento estas kulpa en la besta buĉado en Bielostok kaj multaj aliaj urboj; ĉar la Rusa gento neniam estis kruela kaj sangavida; oni scias, ke ne la Tataroj kaj Armenoj estas kulpaj en la konstanta buĉado, ĉar ambaŭ gentoj estas gentoj trankvilaj, ne deziras altrudi al iu sian regadon, kaj la sola, kion ili deziras, estas nur, ke oni lasu ilin trankvile vivi.</p>	<p>Ich will Ihnen nicht die schrecklichen Einzelheiten der bestialischen Metzerei von Bielostok erzählen; ihnen als Esperantisten will ich nur sagen, daß zwischen den Völkern die Mauern, gegen welche wir ankämpfen, noch schrecklich hoch und dick sind.</p>
<p>Oni scias nun tute klare, ke kulpa estas aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dismetataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj.</p>	<p>Man weiß, daß nicht das russische Volk schuld ist an der bestialischen Schlächtereier in Bielostok und vielen anderen Städten; denn der russische Volksstamm ist niemals grausam und blutgierig gewesen; man weiß, daß nicht die Tataren und Armenier an dem ständigen Gemetzel schuld sind, denn beide sind ruhige Stämme; sie wünschen nicht, irgend jemandem ihre Herrschaft aufzudrängen — das einzige, was sie wünschen ist, daß man sie nur ruhig leben lasse.</p>
<p>Sed ĉu la plej grandaj mensogoj kaj kalumnioj povus doni tiajn terurajn fruktojn, se la gentoj sin reciprokas bone konus, se inter ili ne status altaj kaj dikaj muroj, kiuj malpermesas al ili libere komuniĝadi inter si kaj vidi, ke la membroj de nia gento, ke ilia literaturo ne predikas iajn terurajn krimojn sed havas tiun saman etikon kaj tiujn samajn idealojn kiel nia?</p>	<p>Man weiß es nun ganz klar; schuld ist eine Schar verabscheuungswürdiger Verbrecher, die durch verschiedene und niedrigste Mittel, durch haufenweise ausgestreute Lügen und Verleumdungen, künstlich einen schrecklichen Haß zwischen den einzelnen Volksstämmen schaffen.</p>
<p>Rompu, rompu la murojn inter la popoloj, donu al ili la eblon, libere konatiĝi kaj komuniĝi sur neŭtrala fundamento, kaj nur tiam povos malaperi tiaj bestaĵoj, kiujn ni nun vidas en diversaj lokoj!</p>	<p>Könnten aber auch die größten Lügen und Verläumdungen solch schreckliche Früchte ergeben, wenn die Volksstämme einander gut kennen, wenn zwischen ihnen nicht hohe und dicke Mauern stünden, die es ihnen verwehren, frei untereinander zu verkehren, und zu sehen, daß die Mitglieder anderer Stämme ganz ebensolche Menschen sind wie unsere eigenen Stammesangehörigen, daß ihr Schrifttum nicht irgendwelche schreckliche Verbrechen predigt, daß es vielmehr dieselbe Ethik, dieselben Ideale besitzt, wie das unsere?</p>
<p>Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj; ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scas tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komuniĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de <i>tiu</i> bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona</p>	<p>Zerbrechet, zerbrechet die Mauern zwischen den Völkern; gebet ihnen die Möglichkeit, ungehemmt</p>

<p>volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado.</p> <p>Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, Esperantistoj, devas labori pli energie ol iam.</p> <p>Sed por ke nia laborado estu fruktoporta, ni devas antaŭ ĉio bone klarigi al ni la internan ideon de la Esperantismo.</p> <p>Ni ĉiuj senkonscie ofte aludadas tiun ĉi ideon en niaj paroloj kaj verkoj, sed ni neniam parolis pri ĝi pli klare.</p> <p>Estas jam tempo, ke ni parolu pli klare kaj precize.</p> <p>El la deklaro unanime akceptita en la Boulogne'a kongreso, ni ĉiuj scias, kio estas la Esperantismo en rilato praktika; el tiu ĉi deklaro ni ankaŭ scias, ke „Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas”.</p> <p>Esperantisto sekve estas ne sole tiu persono, kiu uzas Esperanton sole kaj ekskluzive por celoj praktikaj; Esperantisto ankaŭ estas persono, kiu uzas Esperanton, por gajni per ĝi monon; Esperantisto estas persono, kiu uzas Esperanton nur por amuziĝadi; Esperantisto fine estas eĉ tiu persono, kiu uzas Esperanton por celoj plej malnoblaj kaj malamaj.</p> <p>Sed krom la flanko praktika, deviga por ĉiuj kaj montrita en la deklaro, la Esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan, flankon idean.</p> <p>Tiun ĉi flankon diversaj Esperantistoj povas klarigi al si en la plej diversa maniero kaj en la plej diversaj gradoj.</p>	<p>miteinander bekannt zu werden und auf neutralem Boden miteinander zu verkehren; nur dann werden solche Bestialitäten verschwinden können, wie wir sie nun an verschiedenen Orten sehen.</p> <p>Wir sind nicht so einfältig, wie es einige Leute von uns denken; wir glauben nicht, daß eine neutrale Grundlage aus den Menschen Engel machen wird; wir wissen sehr gut, daß die schlechten Menschen auch nachher schlecht bleiben werden; aber wir glauben, daß ein Verkehr und ein Bekanntwerden auf neutralem Boden wenigstens die große Menge von <i>jenen</i> Bestialitäten und Verbrechen beseitigen wird, die nicht von bösem Willen hervorgerufen werden, sondern von gegenseitigem Nichtkennen und erzwungenem Sichaufdrängen.</p> <p>Nun, da an verschiedenen Orten der Welt der Kampf zwischen den Volksstämmen derart grausam geworden ist, müssen wir Esperantisten tatkräftiger denn je arbeiten.</p> <p>Doch damit unsere Arbeit fruchtbar sei, müssen wir uns vor allem die dem Esperanto innewohnende Idee genau klar machen.</p> <p>In unseren Worten und Werken spielten wir alle unbewußt wohl oft auf diese Idee an, aber niemals sprachen wir darüber deutlicher.</p> <p>Nun ist es an der Zeit, klarer, genauer zu reden.</p> <p>Aus der auf dem Boulogner Kongresse einstimmig angenommenen öffentlichen Erklärung, wissen wir alle, was Esperanto in praktischer Hinsicht bedeutet; aus dieser öffentlichen Erklärung wissen wir auch, daß „jede Person, die Esperanto — ganz gleichgültig zu welchem Zwecke — gebraucht, Esperantist genannt wird“.</p> <p>Esperantist ist folglich nicht nur jener, der Esperanto einzig und ausschließlich für praktische Zwecke verwendet; Esperantist ist auch eine Person, die Esperanto verwendet, um Geld damit zu</p>
---	---

<p>Tial, por eviti ĉiun malpacon, la Esperantistoj decidis, lasi al ĉiu plenan liberecon akcepti la internan ideon de la Esperantismo en tiu formo kaj grado, kiel li mem deziras, aŭ – se li volas – eĉ tute ne akcepti por la Esperantismo ian ideon.</p> <p>Por demeti de unuj Esperantistoj ĉian respondecon por la agoj kaj idealoj de aliaj Esperantistoj, la Bulonja deklaro precizigis la oficialan, de ĉiuj sendispute akceptitan esencon de la Esperantismo kaj aldonis la sekvantajn vortojn:</p> <p>„Ĉiu alia espero aŭ revo, kiun tiu aŭ alia persono ligas kun la Esperantismo, estas lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.”</p> <p>Sed bedaŭrinde la vorton „privata” kelkaj amikoj-Esperantistoj klarigis al si en la senco de „malpermesata”, kaj tiamaniere, anstataŭ konservi por la interna ideo de la Esperantismo la eblon tute libere dissolvi, ili volis tiun ideon tute mortigi.</p> <p>Se ni, batalantoj por Esperanto, propravole donis al la vasta mondo plenan rajton rigardadi Esperanton nur de ĝia flanko praktika kaj uzado ĝin nur por nia utilo, tio ĉi kompreneble al neniu donas la rajton postuli, ke ni ĉiuj vidu en Esperanto nur aferon praktikan.</p> <p>Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la Esperantistoj aperis tiaj voĉoj, kiuj diras: „Esperanto estas <i>nur</i> lingvo; evitu ligi eĉ tute private la Esperantismon kun la <i>ideo</i>, ĉar alie oni pensos, ke ni ĉiuj havas tiun ideon, kaj ni malplaĉos al diversaj personoj, kiuj ne amas tiun ideon!</p> <p>Ho kiaj vortoj! El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi</p>	<p>verdienern; Esperantist ist jemand, der Esperanto nur zu seiner Unterhaltung gebraucht; Esperantist ist schließlich sogar der, welcher Esperanto zu den niedrigsten und verhaßtesten Zwecken benützt.</p> <p>Aber außer der praktischen Seite, die für alle verbindlich ist und in der öffentlichen Erklärung aufgezeigt wurde, hat der Esperantismus noch eine andere, eine zwar nicht verbindliche, aber viel wichtigere, ideelle Seite.</p> <p>Diese Seite des Esperantismus können verschiedene Esperantisten sich auf die verschiedenste Weise denken und ihr Vorhandensein in den verschiedensten Graden annehmen.</p> <p>Deshalb, um jeden Unfrieden zu vermeiden, haben die Esperantisten beschlossen, jedem volle Freiheit darin zu lassen, die dem Esperanto innewohnende Idee in der Form und in dem Ausmaße anzunehmen, wie er es selbst wünscht oder — wenn er will — für den Esperantismus überhaupt keinerlei Idee anzunehmen.</p> <p>Um den einzelnen Esperantisten jegliche Verantwortung für die Handlungen und Ideale anderer Esperantisten abzunehmen, legte die öffentliche Erklärung von Boulogne das offizielle, von allen unbestritten angenommene Wesen des Esperantismus fest und fügte die folgenden Worte hinzu:</p> <p>„Jede andere Hoffnung oder jeder Traum, den der eine oder der andere mit dem Esperantismus verbindet, ist seine rein private Angelegenheit, für die der Esperantismus nicht verantwortlich ist.“</p> <p>Bedauerlicherweise legten aber einige meiner esperantistischen Freunde sich das Wort „privat“ im Sinne von „unerlaubt“ aus und wollten auf diese Art, anstatt der dem Esperanto innewohnenden Idee die Möglichkeit zu bewahren, sich unbehindert zu entwickeln, diese Idee gänzlich umbringen.</p>
--	---

<p>Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas <i>ĉiuj</i> elŝiri el nia koro tiun parton de la Esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto!</p>	<p>Wenn wir, die wir für Esperanto kämpfen, freiwillig der weiten Welt das volle Recht gaben, Esperanto nur von seiner praktischen Seite aus zu betrachten und es nur zu unserem Nutzen zu gebrauchen, so gibt dies natürlich niemandem das Recht, zu verlangen, daß wir alle in Esperanto nur eine praktische Sache sehen.</p>
<p>Ho, ne, ne neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon.</p>	<p>Leider sind in der letzten Zeit unter den Esperantisten Stimmen laut geworden, die da sagen: „Esperanto ist <i>nur</i> eine Sprache; vermeidet es den Esperantismus, wenn auch ganz privat, mit irgendeiner <i>Idee</i> zu verbinden, denn man wird sonst glauben, daß wir <i>alle</i> diese Idee haben, und wir werden bei verschiedenen Leuten, die diese Idee nicht lieben, Mißfallen erregen!</p>
<p>Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni nenigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: „Kun <i>tia</i> Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!”</p>	<p>O was für Worte! Aus Angst, daß wir vielleicht jenen, die Esperanto für sich nur zu praktischen Zwecken verwenden wollen, nicht gefallen werden, sollen wir <i>alle</i> jenen Teil des Esperantismus, welcher der wichtigste, der heiligste ist, jene Idee, welche stets das Hauptziel der Esperantosache, welche der Stern war, der von jeher alle Kämpfer für Esperanto geleitet hat, aus unserem Herzen reißen!</p>
<p>Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton.</p>	<p>O nein, nein, niemals! Mit energischem Einspruch werfen wir diese Forderung.</p>
<p>Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj Esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava <i>ideo</i>, kiun lingvo internacia en si enhavas.</p>	<p>Wenn man uns, die ersten Kämpfer für Esperanto, zwingt, in unserer Handlung alles Ideelle zu vermeiden, dann werden wir entrüstet alles zerreißen und verbrennen, was wir für Esperanto geschrieben haben, wir werden schmerzerfüllt die Arbeiten und Opfer unseres ganzen Lebens verleugnen, wir werden den grünen Stern, der uns an der Brust sitzt, weit von uns schleudern und mit Abscheu werden wir ausrufen: „Mit einem <i>solchen</i> Esperanto, mit einem Esperanto, das ausschließlich nur Zwecken des Handels und praktischem Gebrauch dienen soll, wollen wir nichts gemein haben!“</p>
<p>Tiu ĉi ideo – vi ĉiuj sentas ĝin tre bone – estas <i>frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj</i>.</p>	
<p>Tiu ĉi ideo akompanadis Esperantismon de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la unua tempo. Ĝi instigis la aŭtoron de Esperanto, kiam li estis ankoraŭ malgranda infano; kiam antaŭ</p>	

<p>dudek ok jaroj rondeto da junaj diversgentaj gimnazianoj festis la unuan signon de vivo de la estonta Esperanto, ili kantis kanton, en kiu post ĉiu strofo estis ripetataj la vortoj: „malamikeco de la nacioj, falu, falu, jam estas tempo”.</p>	<p>Es wird einst die Zeit kommen, da Esperanto, nachdem es Gemeingut der ganzen Menschheit geworden ist, seinen ideellen Charakter verlieren wird; dann wird es nur mehr eine Sprache werden, man wird nicht mehr dafür kämpfen, man wird nur mehr Nutzen daraus ziehen.</p>
<p>Nia himno kantas pri la „nova sento, kiu venis en la mondon”, ĉiuj verkoj, vortoj kaj agoj de la iniciatoro kaj de la nunaj Esperantistoj ĉiam spiras tute klare tiun saman ideon.</p>	<p>Doch jetzt, da noch fast alle Esperantisten nicht Nutznießer, sondern nur Kämpfer sind, sind wir alle uns sehr wohl bewußt, daß nicht der Gedanke an praktische Verwendbarkeit uns zur Arbeit für Esperanto anspornt, sondern nur der Gedanke an die heilige, große und wichtige Idee, welche eine internationale Sprache in sich birgt.</p>
<p>Neniam ni kaŝis nian ideon, neniam povis esti eĉ la plej malgranda dubo pri ĝi, ĉar ĉiu parolis pri ĝi, kaj sindone laboris.</p>	<p>Diese Idee — Sie alle fühlen sie sehr wohl — ist Brüderlichkeit und Gerechtigkeit unter allen Völkern.</p>
<p>Kial do aliĝis al ni la personoj, kiuj vidas en Esperanto „nur lingvon”?</p>	<p>Diese Idee hat den Esperantismus vom ersten Augenblick seines Entstehens bis in die jetzige Zeit begleitet.</p>
<p>Kial ili ne timis, ke la mondo kulpigos ilin pri granda krimo, nome pri la deziro, helpi al iom-post-ioma-unuiĝo de la homaro?</p>	<p>Sie regte den Urheber des Esperanto an, als er noch ein kleines Kind war; als vor achtundzwanzig Jahren ein kleiner Kreis von jungen, verschiedenen Stämmen angehörigen Gymnasiasten das erste Lebenszeichen des künftigen Esperanto feierte, da sangen sie ein Lied, in dem nach jeder Strophe die folgenden Worte wiederholt wurden: „Feindschaft unter den Nationen, falle, falle, es ist schon an der Zeit!”</p>
<p>Ĉu ili ne vidas, ke iliaj paroloj estas kontraŭaj al iliaj propraj sentoj kaj ke ili senkonscie revas pri tio sama, pri kio <i>ni</i> revas, kvankam pro neĝusta timo antaŭ sensecaj atakantoj ili penas tion ĉi nei?</p>	<p>Unsere Hymne singt von dem „neuen Gefühl, das in die Welt kam“, alle Werke, Worte und Handlungen des Urhebers des Esperanto und der jetzigen Esperantisten atmen stets ganz deutlich dieselbe Idee.</p>
<p>Se mi la tutan pli bonan parton de mia vivo memvole pasigis en grandaj suferoj kaj oferoj kaj ne rezervis por mi eĉ ian rajton de aŭtoreco – ĉu mi faris tion ĉi pro ia praktika utileco?</p>	<p>Niemals haben wir unsere Idee verheimlicht, niemals konnte auch nur der geringste Zweifel darüber bestehen, denn jeder sprach darüber und arbeitete hingebungsvoll dafür.</p>
<p>Se la unuaj Esperantistoj pacience elmetadis sin ne sole al konstanta mokado, sed eĉ al grandaj oferoj, kaj ekzemple unu malriĉa instruistino longan tempon suferis malsaton, nur por ke ŝi povu ŝpari iom da mono por la propagando de Esperanto – ĉu ili ĉiuj faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se ofte personoj alforĝitaj al la lito de morto skribadis al mi, ke Esperanto estas la sola</p>	

<p>konsolo de ilia finiĝanta vivo, ĉu ili pensis tiam pri la praktika utileco?</p>	<p>Warum haben sich uns also Leute angeschlossen, die in Esperanto „nur eine Sprache“ sehen?</p>
<p>Ho, ne, ne, ne! Ĉiuj memoris nur pri la interna <i>ideo</i> entenata en la Esperantismo; ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas reciproke la <i>korpojn</i> de la homoj, eĉ ne tial, ke ĝi alproksimigas la <i>cerbojn</i> de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn <i>korojn</i>.</p>	<p>Warum fürchteten sie nicht, daß die Welt sie eines großen Verbrechens beschuldigen würde, nämlich des Wunsches der Menschheit zu einer allmählichen Vereinigung zu verhelfen?</p>
<p>Vi memoras, kiel forte ni ĉiuj estis entuziasmitaj en Bulonjo ĉe l'Maro. Ĉiuj personoj, kiuj partoprenis en la tiea kongreso, konservis pri ĝi la plej agrablan kaj plej entuziasman memoron por la tuta vivo, ĉiuj ĝin nomas „la neforgesebla kongreso“.</p>	<p>Sehen sie nicht, daß ihre Worte im Gegensatz zu ihren eigenen Gefühlen stehen und daß sie unbewußt dasselbe erträumen wie wir, obgleich sie aus falscher Furcht vor unvernünftigen Angreifern sich bemühen, dies zu leugnen?</p>
<p>Kio do tiel entuziasmigis la membrojn de la kongreso? Ĉu la amuzoj per si mem? Ne, ĉiuj ja povas havi sur ĉiu paŝo multe pli grandajn amuzojn, aŭskulti teatraĵojn kaj kantojn multe pli bonajn kaj plenumatajn ne de nespertaj diletantoj, sed de plej perfektaj specialistoj!</p>	<p>Wenn ich den ganzen besseren Teil meines Lebens unter großen Leiden und Opfern verbrachte und mir nicht einmal irgendein Urheberrecht vorbehielt — tat ich dies um irgendeines praktischen Nutzens willen?</p>
<p>Ĉu nin entuziasmigis la granda talento de la parolantoj? Ne; ni tiajn ne havis en Bulonjo. Ĉu la fakto, ke ni komprenis nin reciproke? Sed en ĉiu kongreso de samnacioj ni ja komprenas nin ne malpli bone, kaj tamen nenio nin entuziasmigas.</p>	<p>Wenn die ersten Esperantisten sich geduldig nicht nur beständigem Hohn, sondern sogar großen Opfern aussetzten, und zum Beispiel, eine arme Lehrerin lange Zeit Hunger litt, nur um für die Verbreitung des Esperanto etwas Geld zusammensparen zu können — taten sie alle dies nur irgendeines praktischen Vorteiles wegen?</p>
<p>Ne, vi ĉiuj sentis tre bone, ke nin entuziasmigis ne la amuzoj per si mem, ne la reciproka sinkomprenado per si mem, ne la praktika utileco, kiun Esperanto montris, sed la interna <i>ideo</i> de la Esperantismo, kiun ni ĉiuj sentis en nia koro.</p>	<p>Wenn mir oft ans Sterbebett gefesselte Personen schrieben, daß Esperanto der einzige Trost ihres zur Neige gehenden Lebens sei, dachten diese dabei wohl an irgendeinen praktischen Vorteil?</p>
<p>Ni sentis, ke komenciĝis la falado de la muroj inter la popoloj, ni sentis la spiriton de ĉiuhoma frateco.</p>	<p>O nein, nein, nein! Alle gedachten nur der dem Esperanto innewohnenden <i>Idee</i>; alle schätzten Esperanto nicht deshalb, weil es die Körper der Menschen einander nähert, sogar nicht einmal deshalb, weil es ihre Gehirne zusammenführte, sondern nur deshalb, weil es ihre Herzen einander nahe bringt.</p>
<p>Ni konsciis tre bone, ke, ĝis la fina malapero de la muroj, estas ankoraŭ tre kaj tre</p>	<p>Sie erinnern sich, welch starke Begeisterung sich unser aller in Boulogne am Meer bemächtigte. Alle, die an dem dortigen Kongreß teilnahmen, haben</p>

<p>malproksime; sed ni sentis, ke ni estas atestantoj de la unua ekbato kontraŭ tiuj muroj; ni sentis, ke antaŭ niaj okuloj flugas la fantomo de pli bona estonteco, fantomo ankoraŭ tro nebula, kiu tamen de nun ĉiam pli kaj pli korpigados kaj potenciĝados.</p> <p>Jes, miaj karaj kunlaborantoj! Por la indiferenta mondo Esperanto povas esti nur afero de praktika utileco. Ĉiu, kiu uzas Esperanton aŭ laboras por ĝi, estas Esperantisto, kaj ĉiu Esperantisto havas plenan rajton vidi en Esperanto nur lingvon, simplan, malvarman internacian kompreniĝilon, similan al la mara signaro, kvankam pli perfektan.</p> <p><i>Tiaj</i> Esperantistoj kredeble ne venos al niaj kongresoj aŭ venos al ili nur por celoj esploraj, praktikaj aŭ por malvarma diskutado pri demandoj pure lingvaj, pure akademias, kaj ili ne partoprenos en nia ĝojo kaj entuziasmo, kiu eble ŝajnos al ili naiva kaj infana.</p> <p>Sed tiuj Esperantistoj, kiuj apartenas al nia afero ne per sia kapo, sed per sia <i>koro</i>, kiuj ĉiam sentos kaj ŝatos en Esperanto antaŭ ĉio ĝian internan <i>ideon</i>; ili ne timos, ke la mondo mokenomos ilin utopiistoj, kaj la naciaj ŝovinistoj eĉ atakos ilian idealon kvazaŭ krimon; ili estos fieraj pri tiu nomo de utopiistoj.</p> <p>Ĉiu nia nova kongreso fortikiĝos en ili la amon al la interna ideo de la Esperantismo, kaj iom post iom niaj ĉiujaraj kongresoj fariĝos konstanta festo de la homaro kaj de la homa frateco.</p>	<p>sich fürs ganze Leben die angenehmste und begeistertste Erinnerung daran bewahrt, alle nennen ihn den unvergeßlichen Kongreß.</p> <p>Was war es denn, das die Mitglieder des Kongresses so sehr begeisterte? Waren es die Unterhaltungen an und für sich? Nein, jeder kann ja auf Schritt und Tritt viel großartigere Unterhaltungen haben; viel bessere und nicht von unerfahrenen Dilettanten, sondern von den vollkommensten Fachleuten aufgeführte Theaterstücke und Gesänge anhören!</p> <p>Begeisterte uns die große Begabung der Redner? Nein; solche hatten wir nicht in Boulogne. War es die Tatsache, daß wir einander verstanden? Allein, bei jedem Kongreß von Volksgenossen verstehen wir uns ja nicht weniger gut und dennoch versetzt uns nichts in Begeisterung.</p> <p>Nein, Sie alle fühlen sehr wohl, daß es nicht die Unterhaltung an und für sich war, nicht das gegenseitige Verstehen, nicht der praktische Vorteil, den Esperanto aufweist, sondern die dem Esperantismus innewohnende <i>Idee</i> war es, welche wir alle im Herzen spürten.</p> <p>Wir fühlten, daß die Mauern zwischen den Völkern zu fallen beginnen, wir fühlten den Geist der allgemein menschlichen Brüderlichkeit.</p> <p>Wir waren uns sehr wohl bewußt, daß es noch sehr, sehr weit bis zum endgültigen Verschwinden der Mauern sei; aber wir fühlten, daß wir Zeugen des ersten starken Schlages gegen jene Mauern seien; wir fühlten, daß vor unseren Augen irgendein Geist einer besseren Zukunft schwebte, ein noch sehr nebelhafter Geist, der jedoch von nun an immer mehr an Gestalt and Macht gewinnen würde.</p> <p>Jawohl, meine lieben Mitarbeiter! Für die gleichgültige Welt mag Esperanto nur eine Sache des praktischen Vorteiles sein. Jeder, der Esperanto verwendet oder dafür arbeitet, ist Esperantist und</p>
--	---

	<p>jeder Esperantist hat das volle Recht, in Esperanto nichts als eine bloße Sprache zu sehen, ein einfaches, nüchternes, zwischenvölkisches Verständigungsmittel, ähnlich dem System der Seesignale, wenn auch vollkommener als dieses.</p> <p><i>Solche</i> Esperantisten werden wahrscheinlich zu unseren Kongressen nicht oder doch nur zu Forschungszwecken, zu praktischen Zwecken oder behufs kalter Erörterung rein sprachlicher, rein akademischer Fragen kommen und sie werden an unserer Freude und Begeisterung, die ihnen möglicherweise einfältig und kindisch vorkommen wird, nicht teilnehmen.</p> <p>Doch jene Esperantisten, die unserer Sache nicht mit dem Kopfe, sondern mit dem <i>Herzen</i> angehören, die werden an Esperanto immer und vor allem die ihm inwohnende Idee spüren und schätzen; sie werden sich nicht davor fürchten, daß die Welt sie höhnisch Utopisten nennt und daß die völkischen Hetzpatrioten ihr Ideal sogar wie ein Verbrechen angreifen; sie werden auf diesen Namen „Utopisten“ stolz sein.</p> <p>Jeder neue unserer Kongresse wird in ihnen die Liebe zur internen Idee des Esperantismus festigen und nach und nach werden unsere alljährlichen Kongresse zu einem ständigem Fest der Menschheit und der menschlichen Brüderlichkeit werden.</p>
--	--